



Boletín

Nº 362 septembro/oktobro 2003

**Sukcesa
Kongreso**

Asociación de utilidad pública

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Redaktisto: Miguel Gutiérrez Adúriz;
Los Coterros 1-C, 2-I; ES-39600
Muriedas; Cantabria;
bulteno@esperanto-es.net

*Nota: Pri la enhavo de la artikoloj
respondecas nur la respektivaj aŭtoroj.*

*La redaktisto rajtas libere rifuzi ne
petitajn artikolojn.*

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid;

Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79

Konto ĉe BBVA :

0182-2552-61-0204011.961

Admin@esperanto-es.net

www.esperanto-es.net

Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho.

Vicprezidanto: José M. Galofré.

Sekretario: Manuel Parra.

Kasisto: Pedro Garrote.

Vicsekretario: Marcos Cruz.

Voĉdonantoj: Luis Hernández,

Augusto Casquero

Miguel Gutiérrez.

Enhavo

Ĝenerala Kunsido	2
Estrarkunsido	3
62a HK (MZD)	4
Kaj multaj aliaj aferoj (MZD)	13
Gran Diccionario: la revo realiĝis.	14
Elkora omaĝo (<i>Berta</i>)	15
Ni nin! (<i>Marcos Cruz</i>)	16
HSPPE kaj la Valencia E-Grupo (<i>Antonio Marco</i>)	18
Pri Grupoj Asocioj kaj tiel plu	19
La pedalaŭto	22
Agadplano (<i>Antonio del Barrio</i>)	18
Ĉirkaŭ la mondo	26
HEF-novaĵoj	27
Urĝa Peto (<i>Renato Corsetti</i>)	27
Tiel naskiĝis "LA DEKA LOGO" (<i>Ana Manero</i>)	28
Kongresa aliĝilo	32
Du eksterordinaraj verkoj	k-d



FUNDACIÓN
ESPERANTO

Faras la movadon...GRANDA

Kontribuu pere de:

Iber-Caja

2085-0101-13-0128624762

La Caixa

2100-2149-31-0100165085



La 19an de julio 2003 je la 10:30 horo en Colegio Mayor la Asunción, Valencia, okazis la Ordinara Ĝenerala Kunsido de Hispana Esperanto Federacio, laŭ siatempa alvoko. Ĉeestis 24 membroj, inter ili jenaj estraranoj: Miguel Ángel Sancho, prezidanto; Pedro Garrote, kasisto; Manuel Parra, sekretario; Marcos Cruz, vicsekretario; Augusto Casquero kaj Miguel G. Adúriz, voĉdonantoj.

Traktitaj punktoj:

a) Lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa kunsido.

La sekretario laŭtlegis ĝin. Sen pliaj komentoj, la protokolo estis unuanime aprobita.

b) Prezento kaj eventuala aprobo de la kontoektato kaj agadraporto 2002.

Oni ne laŭtlegas ĝin ĉar estis publikigitaj en Boletín n-ro 361. La kasisto klarigis la konsiston de la ĉefaj kontoj, kaj la prezidanto priskribis la financon staton de la asocio kompare al pasintaj jaroj. La kunsidantoj unuanime aprobis la dokumentojn.

2—

Ĝenerala Kunsido

c) La Prezidanto laŭtlegas la jarraporton de la jaro 2002 de Fundación Esperanto.

ĉ) Demandoj, petoj, proponoj.

Ni kreas skipon kiu kunordigos la agadojn por jubilei la centjariĝon de la Esperanto-movado en Hispanio, de nun ĝis junio 2004.

Oni proponas ke HEF eldonu la jam faritan hispanlingvan tradukon de “El desafío de las lenguas”, de Claude Piron. La estraro konsideros la proponon.

Pri la pasintjara decido krei novan kategorion de simpatiantaj membroj, klarigas Marcos Cruz, ke ĝi ne realiĝis ĉar oni donis prioritaton al aliaj pli urĝaj taskoj. Oni serĉos volontulojn por la koncerna laboro.

Iu proponas ke la asocio iel priatentu la membrojn kiuj ne regas Esperanton. Marcos respondas la samon: serĉatas volontulo.

La 63a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en Bilbao koincide kun la 6a Eŭropunia Esperanto-Kongreso, de la 25a ĝis la 29a de aŭgusto 2004.

Tial ke ne prezentigis pliaj traktendaj aferoj, je la 11:50 horo la prezidanto fermis la kunsidon.

La Prezidanto, Miguel Ángel Sancho
La Sekretario, Manuel Parra
HEF-Bulteno n-ro 362

2 Bugelo? 1 Antonio 10/2003

Estrarkunsido

La HEF-estraro kunsidis en Colegio Mayor la Asunción, Valencia, kadre de la Hispana E-Kongreso, la tagon 15an de julio 2003 ekde la 12a horo. Ĉeestis la estraranoj Pedro Garrote, Manuel Parra, Augusto Casquero kaj Miguel Gutiérrez, plus kelkaj aliaj HEF-anoj.

Pritraktitaj aferoj:

1-La sekretario laŭtlegas la protokolon de la antaŭa kunsido (decembro 2002), kaj oni ĝin aprobas. Pri la ĝisnuna plenumo de ties decidoj, estas jam kontaktita la muzeo “La Casa de las Palabras” en Vigo, kun la rezulto ke certe en ĝi oni montros la lingvon Esperanto.

2- Estis akceptita la dokumento “Agadplano okaze de la centjara datreveno de la Esperanto-movado en Hispanio”, kiu proponas diversajn agadojn de nun ĝis junio-2004.

3- Laŭ konsento kun la prezidanto de la LKK de la Eŭropunia E-kongreso, okazonta en Bilbao aŭguste de 2004, HEF kunlaboros al ĝia organizado per informado en nia organo Boletín, kaj per plenumo de nia Ĝenerala Kunveno kadre de tiu kongreso.

Retadreso de *Boletín*
bulteno@esperanto-es.net



La Prezidanto: Miguel Ángel Sancho

4- Laŭ peto de kelkaj membroj, ekde la sekva jaro en Boletín aperos apud la oficiala konto-etato, klariga noto de la kasisto por faciligi la komprenon de la spezoj.

5- Iuj membroj petas publikigon de adresaro de ĉiuj membroj de HEF. Konsultante ke la nunaj leĝoj pri protekto de personaj datumoj malpermesas tion, ni decidis aperigi en Boletín la tutan anaran liston kun la solaj datumoj: nomo kaj urbo.

6- Oni esploros la koston altigi la preskvaliton de Boletín.

La Prezidanto: Miguel Ángel Sancho

La Sekretario: Manolo Parra


62a HK

La mediteranea bordo fariĝis lastatempe konstanta ejo de HEF-kongresoj: San Javier, Alakanto kaj nun Valencio. Tamen, ĉi sinsekvon rompos venontjare Bilbao.

Ĉi-jare Valencio proponis pli altan nivelon en la kvalito de la prezentitaj programeroj. Ni vidu...

Lundo, 14a de julio

La gekongresanoj, alvenintaj unu tagon antaŭe, kunvenis por babili, malfrue



Antaŭlongresa renkontiĝo

vespere, ĉe teraso de trinkejo fronte al la katedralo.

Mardo, 15a de julio:

Je la deka matene komenciĝis en Colegio Mayor la Asunción de Valencio la disdonado de la kongresa dokumentaro.

Kun trafa kriterio, la Filatela Ekspozicio estis muntita en la enir-salono de la kongresejo, tiel ke ankaŭ ne-esperantistoj havis la okazon konatiĝi kun ĉi flanko de nia kulturo.

La malfermo de la Libroservo estis prekaŭ la ununura programero, kiu ne okazis je la antaŭe difinita horo. Cetere, ĝi estis iom malriĉa, eĉ se foje ĝi estis komplementita per eta stablo de SATEH. Feliĉe, tamen, kiel pasintjare, kun kompetento kaj pacienco s-ano Francisco Aliaga okupiĝis pri ĝi. Nu, jen febla flanko de niaj lastatempaj kongresoj, kiun ni devos plibonigi en estontaj aranĝoj.

Akurate je la 11:30 okazis la Prepar-kunveno de Hispana Esperanto-Federacio malfermita al ĉiuj kongresanoj. Je la 12:30 komenciĝis seminario pri enkonduko en la Hispana lingvo, gvidata de la juna samideano Rodrigo Portela Sánchez el Valladolid.

De la 14a ĝis la 16a horo, la kongreso paŭzis por manĝado. Nu, fakte paroli pri kongresa paŭzo estas vera eŭfemismo, ĉar ĝuste en tiu tempo oni sentas ke la granda festo de la esperantismo en nia lando havas sencon: oni aŭdas vigle paroli en Esperanto pri plej diversaj temoj! Cetere la manĝoj okazis en la bonaj instalaĵoj de la *Colegio Mayor*.

Vespere, Sergio Docal el Usono, sidigis ĉe la piano por kantigi la kongresanaron. Poste okazis la Oficiala Malfermo kaj, antaŭ la Interkona Vespere, kordinstrumenta ensemblo prezentis al ni aronda konataj muzikpecoj.

Merkredo, 16a de julio

Je la 9a horo okazis la dua parto de la enkonduko en la Hispana lingvo, kaj poste, je la 10a, Sigita Staisiunaite el Litovio faris aktivan prezenton de "Yumeiho Terapia Masaĝo".

Je la 11a, la Estraro de HEF kunvenis kun delegitoj de la lokaj grupoj. Inte-

(1-2) partoprenintoj en la "Enkonduko en la hispana lingvo."
 (3-4) Sigita instruas la publikon pri Yumeiho terapia masaĝo.





ralie oni parolis pri la lokaj periodaĵoj, kaj Marcos Cruz prezentis la reĵinformaton "HEF-anaro" ĉe Yahoo-groups. Tamen la kunsido haltis ĉe la apero de TV-kamerao. Oni intervjuis s-anon Marcos Cruz kaj filmis plurajn aspektojn de la kongreso.




Je la 13a horo la kongresanaro translokiĝis al la urbodomo por esti oficiale akceptitaj de reprezentanto de la Magistrato.



La akcepton, kiu okazis en plej luksa salono de la urbodomo, faris la Vicurbestro s-ro Alfonso Grau. Li alparolis nin ne nur kun afablo, sed ankaŭ kun apoga simpatio. Liajn vortojn tradukis en Esperanton Antonio del Barrio, kaj la dankajn vortojn en la nomo de la kongreso, faris Miguel Gutiérrez. La Vicurbestro, invitis nin al la kunsido de la Magistrato, kaj klarigis la historion de la salono. Poste oni regaligis nin per abunde da trinkaĵoj kaj kanapoj.

(1) Estraranoj malfermas la Kongreson. (2) Televida intervjuo al Marcos Cruz. (3-4-5) Tri momentoj en la Urbodomo





Posttagmeze, je la 15:30, du aŭtobusoj portis la kongresanojn, kiuj tion deziris, al la porcelanfabriko Lladró, por ĝui gvidatan viziton en la modernaj instalaĵoj de ĉi monde konata entrepreno.

Je la reveno al la kongresejo, estis vera plezuro aŭskulti la interesan prelegon de nia itala samideano Giulio Cappa: “Televido: Ĉu monda danĝero aŭ neŭtrala komunikilo?” prezentita kun la helpo de komputila projekciilo.

Malfrue en la vespero... plaĝumado.

Jaŭdo, 17a de julio

Komence de la tago, la enkonduko en la Hispana lingvo, kaj je la 10:30, prihistoria prelego de Antonio del Barrio, same bone dokumentita kiel lia pasintjara prezento en Alakanto, “Niaj pioniroj: Julio Mangada”, ankaŭ kun la helpo de



(1-2-3) La oficiala akcepto fare de la Vicurbestro. (4) Bildo de la vizito al Lladró. (5) La ensemblo *La amistad el Burjassot*.

(1) Kelkaj samideanoj ĉe la akceptejo de Lladró. (2) Abel Montagut prelegaa pri la poeo de Utnoa. (3) Giulio Cappa pozas por ni. (4) Ĉe la kongreseja kafejo. (5) Giulio Cappa dum la prelego.



komputilo. Poste framda prelego de Augusto Casquero pri la valencia gastronomio, precipe pri la arto kuiri paelon.

Apartan intereson vekis la prelego de la verkisto Abel Montagut: La fiasko de la “Poemo de Utnoa” (dek jarojn poste). La prelegon li bazis sur kritiko farita de Lariko Golden, sed ĉu vere fiasko? oni sin demandis. Kaj la respondo estis ke, je la fino, la aŭtoro disvendis la tutan stokon de la libro, kiun li alportis. Ĉu vi ankoraŭ ne legis ĉi “grandan” verkon de la esperanta literaturo? Kion vi atendas? Tuj mendu ĝin!

Posttagmeze okazis ronda tablo pri “La 25-membra Eŭropo”, kaj, je la 5a, grupo vizitis la “Urbon de la Artoj kaj la



Sciencoj”, dum alia grupo faris privatan viziton en la urbo.

Vendredo, 18a de julio

Unue okazis malfermita kunveno de la Valencian E-Federacion. Sekva programero en la mateno estis la prezento de venontaj kongresoj (UEA, HEF, EEU, VEF.). Intervenis Sigita Staisiunaite kaj Jesús Miguel García, kiu parolis pri la 6a Eŭrop-Unia E-kongreso kaj la Hispana Kongreso, kiuj kune okazos en Bilbao venontjare.

La prezentado de du novaj libroj okazis je la 12a. Unuc estis la vico de la ver-

(1) J. Miguel García prezentas la Hispanan Kongreson de 2004 en Bilbao. (2-3) Grupo de vizitantoj en la Urbo de la Sciencoj kaj la Artoj. (4-5) Antonio del Barrio preleganta.






ko de Antonio Ruiz Negre “Intrigo-teatro” eldonita de Grupo Esperanto de Valencia, kaj poste venis la vico al la detektiveca kaj literatureca “La enigmo de l’ ar@neo” de Abel Montagut, eldonita de Internacia Esperanto-Muzeco de Vieno.

Fine de la mateno, profitante la okazon, private kunvenis la membroj de grupo SAT-Hispanio, kiuj posttagmeze prezentis sin al la ĝenerala publiko kiel fak-grupon sen rilato al HEF.

Du aŭtobusojn kondukis la kongresanaron, je la 17a horo, en la urbo-centron por ĝui tre interesan viziton, gvidatan de profesiulinoj, kiuj lerte instruis nin pri la historia valencia monumentaro. Poste, je la 19a, la populara koruso *Lo Rat Penat* regalis nin per vere plaĉa koncerto.



(1) Unu el la grupoj formiĝintaj por la urba vizito. (2) Antonio Valén respondas la insidajn demandojn de Antonio del Barrio. (3-4) La Urbo de la Sciencoj kaj la Artoj. (4) La ensemblo *Lo Rat Penat*.



Sabato, 19a de julio

Matene okazis religia diservo kiel programero, tamen ne oficiala. kaj poste la Ĝenerala Kunsido de HEF (pri tio legu sur la dua paĝo). Poste oni povis ĝui la amuzan kvizon “Ĉu vi volas esti milonulo?”, gvidata de Antonio del Barrio, en kiu partoprenis elstaraj konkursantoj, Jorge Camacho kaj Antonio Valén!

Fine de la mateno, la longe atendita prezento de Gran Diccionario Español-Esperanto de Fernando de Diego, kiun s-ano Miguel Gutiérrez faris pere de kvin filmetoj kaj poŝtelefono, kiun li uzis ĉe skeĉo, kiu sukcesis ridetigi la iom nerveze atendantan publikon. Nu, 130 kilogramoj da vortaroj kvazaŭ forflugis en apenaŭ kelkaj minutoj.



(1) Ĝenerala Kunsido kun plurkomunikila prezento de la Prezidanto. (2) Trans la fenestro de trinkejo. (3) Di-servo. (4-5) La mirinda aspekto de la kutima paelo, sieĝata de gapuloj.



Kiel aldona premio, ĉe la manĝohoro oni ricevis krom la ĉiutaga menuo, kompreneble, pladon el la giganta paelo kuirita de s-ano Francisco Conejero kaj lia edzino Inés.

En la vespero plia surprizo: la literatura seminario: “El kie ĉerpas verkistoj sian inspiron?”, en kiu partoprenis Liven Dek, Giulio Cappa, Abel Montagut, Antonio Valén, Miguel Fernández, Jorge Camacho, montriĝis plej granda komploto por omaĝi samideanon Miguel Gutiérrez. Sed pri tio legu en aparta angulo de la bulteno.

Fine, je la 19a, okazis la Solena Malfermo de la Kongreso, sekvata de la brila




kaj vigla spektaklo prezentita de la plurfoje premiita ensemblo “Cuadro de Jotas del Centro Aragonés de Valencia”.



100 jarojn poste, la hispana E-movado revenis denove en Valencion por festi, larĝe kaj lukse sian datrevenon.

Kaj venontjare... nu, karaj, ĉiuj al la nordo. Ĉiuj al Bilbao!

MZD

(1) Feliĉaj vizaĝoj atestas ke la kongreso estis ankaŭ amuza. (2) La plaĝo akceptis nin precipe en la vespero. (3-4) . La vigla kaj bunta spektaklo de “Cuadro de Jotas del Centro Aragonés de Valencia”





Kaj multaj aliaj aferoj!

Homoj, kore junaj, kiel Antonio Marco (2) kaj Luis Serrano (3) staris apud la novaj gvidantoj de la hispana movado, Manolo Parra, Pedro Garrote (3) kaj Jesús Miguel García Iturrioz (2 k. 3).


En Valencio, kompreneble, denove libroservis s-ano Aliaga (2). Kaj Jesús de las Heras (1) prezentis sian intereseĝan projekton "Gazetoteko" (vd. *Boletín* 361) por elektronike kompili la tutan kolekton de Kajeroj de la Sudo kaj Boletín.


Ho, jes, ankoraŭ ni devas informi pri du novaj libroj prezentitaj en la kongreso. Sed pri tio, manke de spaco nun, vi legos en la venonta numero de *Boletín*.

MZD

Finiĝis la kongreso kaj José Miguel García Iturrioz portas jam en sia mano la flagon de la venontajara HK. Tie ni revidos nin por kune ĝui multajn novajn surprizojn.

Ĝis revido en Bilbao en 2004!





Gran Diccionario: la revo realiĝis

Miloj, miloj da horoj de penado, de streĉa laboro. Miloj da kilometroj aviadile, trajne, buse kaj aŭte por plurtagaj renkontiĝoj ĉe miloj da notoj, super la tri grandaj volumoj de la fotokopiita manuskripto, aŭ ĉe la klavaro de komputilo, de sunleviĝo ĝis profunda nokto.

Kaj retleteroj? Kiom da retleteroj? Kaj telefonvokoj? Kiom da telefonvokoj? Nu, verŝajne neniu uzanto de la vortaro povos konjekti, malgraŭ la impona aspekto de la verko, kiom da homa strebado necesis por alveni al la fina rezulto, kiun ĝuas jam pli ol tricent hispanaj esperantistoj.

Fernando de Diego, sen ajna dubo, estas la koloso, sed ni ne forgesu la noblan sindonemon de homoj, kiuj helpis rondigi la laboron kaj, tamen, restos por ĉiam en la ombro de la majstro: Antonio Valén, Héctor Álos, Jorge Camacho, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez. Kaj kion diri pri la fratoj de la aŭtoro, Oscar y Octavio, kiu tajpis la unuan manuskripton kun senlima pacienco...

Jes Gran Diccionario Español-Esperanto estas multe, multe pli ol unuavide, oni kredos konstati.

Dankon, koran dankon al ĉiuj kunlaborintoj.

mga

La fotojn por ĉi bulteno pruntis pluraj homoj: Año Belda, Jesús de las Heras, Jesús M. García, Pedro Ullate, Saito Yoshinori, Ángel Arquillos...

Dankon al ĉiuj.

Pri Gran Diccionario Español-Esperanto, kaj pri ĝia prezentado, la legantoj de Boletín povos legi pli en la venonta numero de la kajero.

La redaktisto




Ploris eĉ la sufloro!

Elkora omaĝo


En la sabata vespero, devis okazi Literatura Seminario, titolita “De kie prenas verkistoj sian inspiron?”, kun la partopreno de Liven Dek (MGA), Giulio Cappa, Abel Montagut, Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Antonio Valen, sed baldaŭ la kongresanoj rimarkis, ke temas pri granda surpriza omaĝo al nia s-ano Miguel Gutiérrez, gvidata de Ana Manero. Vera slmontro de sincera amikeco, kiu estigis tre emocian etoson, en kiu eĉ larmoj abundis.

Pri tiu aparta evento de la kongreso, oni povos legi en la venonta Boletín, kvankam, en ĉi tiu numero, oni anticipu ĝuos la artikolon de Ana Manero “Tiel naskiĝis LA DEKA LOGO”, kaj la satiraĵo “ni nin” de Marcos Cruz, kiuj montras kiom multe sanas nia movado.


Berta



Pafo post pafo estas la plej efika atako, kaj jen, post tiom da kugloj el profunda amikeco pafitaj rekte en lian koron, Miguel rompiĝis.



Ni nin!



La granda sukceso de la surpriza omaĝo al nia kara amiko Miguel vekis lavangon da (sin)proponoj por pliaj omaĝotoj. La HEF-estraro tute ne komisiis onin ajn organizi venontajn omaĝojn — do tialas OSOLE(MIO), kies fondinto kaj estrarano estas sola mi, feliĉe kia solon ne timas.

Inter la multaj (sin)proponoj mi unue menciis sennomulino de maskita voĉo kiu telefone arde proponis omaĝi nian senlacan sekretario Manolo, laŭ ŝi eble la nura homo kiu laboras por HEF anstataŭ pripolemiki sian umbilikon.

Letere Manolo mem, rekonebla ĉar per nesufiĉe maskita skribmaniero fuŝe inesk-imita krom enkovertaj barbharoj suspektigaj, proponis surprize omaĝi la responsulinon de la omaĝo, Ana. Li sugestis omaĝi ŝin per anonima donaco de 512 libroj por la de ŝi tenata Esperanto-libroteko Juan RÚgulo, kun po floro.

Ĉar ambaŭ proponoj reciprokas, OSOLE(MIO) leteros al ambaŭ koncertatoj, ke ili prefere omaĝadu sin mem reciproke kaj intime, kio ŝparos tempon kaj laboron al ni ĉiuj.

Pasiaj proponoj venis ankaŭ de ĉiuj ibergrupaj beletruloj. Diveneble, ĉiu proponis ke la ceteraj omaĝu lin mem pro evidentaj meritoj, inklude laŭdan libron, prefere ne nur simple elektronikan sed tridimensian, kun akompanaj sondisko kaj biografia DVD-filmo, kaj nepre per kelkhora laŭdada laŭvica parolado, ĉi-foje registrita por posta onanado inspira.

Anonima mesaĝo ĉe nia telefona respondilo diris, ke maljustas, ke ĉiam “Madrit” sole kaj centre decidu, kiun kaj kie omaĝi. La nekonata voĉo proponis, ke, se bedaŭrinde ankoraŭ ne Unuiĝintaj Nacioj, almenaŭ HEF omaĝu HŜctor pro lia peno plibonigi la internaciajn rilatojn.

Multaj HEF-anoj, krom buso da senvizaj poloj kaj pluraj folkloraj muzikgrupoj, insiste telefonadis, ke ili volas surprize omaĝi nian karan Augusto pro senĉesa, senlaca, senfina kaj senkiala organizado de varmaj Esperanto-kongresoj paelozaj.

Marcos retmesaĝis, ke prefere oni lin avertu minimume unu semajnon antaŭ lia propra omaĝo surpriza, por pretigi amatoran aktoraĵon pli bonan ol mia... Fripono.

La seriozoza HEF-prezidanto telegrame oficiale komunikis, ke ĉar bedaŭrinde ne li mem povos doni al si mem la koncernan oficialan omaĝplaton (des malpli manpremi aŭ brakumi), por lin mem omaĝi nepre venu lia kolego la prezidanto de UEA aŭ almenaŭ lia kolego la prezidanto de EEU, kion cetere li tre meritas, li kromdiris.

David retmesaĝe petis, ke lia surpriza omaĝo okazu dum la dua HoRo, eble en 2020, por ke li ne devu vojaĝi al tedaj maljunuleskaj HEF-kongresoj. Li promesas, por plu meriti la omaĝon, teni sin juna kaj junularsekciestra ĝis tiam ajn per konscia netrofarado energiŝpara.

Venis du tre koincidaj leteraj petoj, el Valadolido kaj Sabadell, ke oni surprize omaĝu iun Luis pro la miraklo amoplene tenadi libroservon dum jaroj malgraŭ nepagipova kaj nelegipova diligenta klientaro.

Plia letera peto el Valadolido proponis omaghi nian kasiston Pedro, per argumento ke sen lia senkompata bilancton-HEF-Bulteno n-ro 362



Suden Ses (eĉ se li tro similas al Marcos Cruz), okaze de la omaĝa monologo

dilo ne povus resti mono en la asocio eĉ por sensuka kaj senplata omaghetto.

Krome telefonis multegaj (ĉ. 7) esperantistoj el la tuta lando kiuj malgraŭ ĉio kuraĝe kaj ŝvite, guton post guto, ankoraŭ instruadas Esperanton en siaj lokaj grupoj. Ili pli malpli plendis same: “malplu da omaĉoj kaj pli de istrŭadon!” (tiele aminde). Ĉu vi, omaĝinda leganto, volas aldoni iun (eble eĉ ne vin mem) en la liston de surprizomaĝutoj? Retmesaĝu vian (sin)proponon al osolemio@alino-me.net kaj ni publikigos ĝin.

Nin kunomaĝu ni!

Eble *Suden Ses*,

Fondinto kaj prezidanto de OSOLE(MIO), “Organizo por Surprizaj Omaĝoj al Laŭdindaj Esperantistoj (Mem-Interesa Organizo)”

HSPPE kaj la Valencia E-Grupo

En 1903, ĝuste antaŭ unu jarcento, Esperanto jam estis akceptita de certaj minoritatoj de idealistoj kaj progresemaj hispanoj, kiuj sopiris al tutmonda interkompreniĝo, kaj al pli pacema kaj homama homaro. Ekfloris do ĉe ni esperantistoj en diversaj regionoj de Hispanio, kaj kelkaj el ili jam aliĝis individue al la Internacia E-Movado.

En Valencio kaj Murcio, tiuj minoritatoj krekis sufiĉe por fondi asociojn. Tamen, ĉar hispanoj ne ŝatas esti kontrolataj, kaj amas agi individue, estis necese ke ili rimarku la efikecon de certaj kolektivitoj, pli konkrete, de la unuaj esperantistaj asocioj, por fine decidiĝi ilin fondi tutlandan asocion, similan al tiuj unuaj starigitaj en Europo. Valencianoj kaj murcianoj kunvenis, la unuan de februaro, kaj fondis la “Hispana Societo por la Propagando de Esperanto”-n (HspPE), kun la celo kunordigi la agadon de la izolitaj geesperantistoj, kaj de la fondotaj Esperanto-Grupoj. Jen ĝia unua estraro:

Prezidanto: Ricardo Codorniu y Starico; Vicprezidanto: Augusto Jiménez Loira; Sekretario: Antonio Guinart Aguilar; Kasisto: Manuel Benavente

Aliaj estraranoj estis: Norman Maclean, Juan Ros Sudriá kaj Antonio López Villanueva. Kiel oni povas konstati, ĉiuj valencianoj kaj murcianoj.

La fervoro de tiuj pioniroj ne satiĝis per tiu grava paŝo kaj ili strebis al novaj progresoj. Tiusence la valencianoj kreis propran societeton en septembro de tiu sama jaro, fondante en la ĉefurbo la “Esperanto Grupo Valencia”-n, kies estraro konsistis el jenaj membroj:

Prezidanto: Augusto Jiménez Loira; Vicprezidanto: Antonio Guinart Aguilar; Sekretario: Enrico Quinza Torrent


Aliaj estraranoj estis: J. Tormo, A. Martínez, P. Dauden, P. Cervantes, J. Llerred, J. Vidal. E. de Aguirre kaj s-ro Mascarell.

Kiel frukto de senlima entuziasmo, unu monaton poste aperis en Valencio la unua numero de la gazeto “La Suno Hispana”, redaktita de s-ano Jiménez Loira, kiel organo ne nur de la Valencia E-Grupo, sed ankaŭ de la E-Grupo de Murcio kaj de la “Hispana Societo por propagando de Esperanto”.

Unu jarcenton poste, la “E-Grupo Valencia” kaj “Hispana E-Federacio” volis soleni tiujn eventojn per la 62a HEF-Kongreso kaj la 13a Internacia E-Kongreso.

Mi, kiel modesta esperantisto, gratulas la iniciatintojn kaj la organizantojn de tiuj aranĝoj, kiuj precipe celas omaĝi niajn pionirojn. Dankon al vi!

Antonio Marco Botella
HEF-Bulteno n-ro 362



Pri Grupoj, Asocioj kaj tiel plu.

Asturio

* “La Voz de Asturias” informis la 12an de julio pri la geedziĝo de Cesáreo García, Prezidanto de Antaŭen, kaj Teresa Gutiérrez, ambaŭ vestitaj en tradiciaj asturiaj kostumoj. La ceremonio okazis en la asturia lingvo, Bable, kaj Esperanto.

Brusela Komunikadcentro

* “La voz de Avilés” raportis, kun foto, pri la apero de la 30a numero de la bulteno Antaŭen.

* “Periódico de Gijón” publikigis, la 12an de aŭgusto, koncizan sed trafan informon pri Esperanto, senditan de Julio Argüelles el la UK en Goteborg.

Brusela Komunikadcentro


Ekstremaduro

Aperis artikolo kun foto la 2an de julio en loka ĵurnalo informante pri la partopreno de José M-a Salguero kaj Carmen Cidoncha en la sveda UK, kaj pri Esperanto ĝenerale.

HEF-Bulteno n-ro 362

Post la apero de la artikolo, lokaj televidkanalo kaj radiostacio intervjuis s-anon Salguero.

Brusela Komunikadcentro



Prezentado en la UK de la 6a Eŭrop-Unia kongreso okazanta en Bilbao en 2004

Eŭskio / Vaskio


* Tri membroj de la E-Grupo de Bilbao partoprenis la Hispanan Kongreson en Valencio, kie ili prezentis la 6an Eŭropan kongreson, kiu okazos venontjare en Bilbao.

* Du membroj de la grupo de Bilbao partoprenis en la ĉijara UK. Tie ili renkontiĝis kun Lourdes Martinez, bilbaoanino loĝanta en Germanio. Ili aktive partoprenis la kunvenojn kaj debatojn de Eŭropa E-Unio, publike prezentis la kongreson de la jaro 2004 en nia urbo, starigis propagandan budon por disdoni aliĝilojn, afiŝojn, informojn kaj memoraĵojn pri Bilbao, ktp. Vere, la nomo de nia urbo estas jam konata de preskaŭ ĉiuj partoprenantoj en la UK.

* La organizado de kongreso antaŭeniras. Ĝis la 31a de aŭgusto aliĝis 16 homoj, plejparte eksterlandaj. Baldaŭ sekvos informoj pri loĝado en Bilbao.

* La 12an de septembro okazos ĝenerala asambleo de nia asocio; interalie, oni definitive nomumos la LKK de la kongreso kaj poluros la provizoran programon; okupiĝos pri la kristnaska loterio kaj pri organizado de elementa kurso.

J. Miguel Garcia Iturrioz



Flortapiŝo de ESTO



Kantabraj e-istoj en Las Tuerces

Kantabrio

Kanariaj Insuloj

Kiel kutime, ESTO, per la majstra mano de Jose Luis Cruz kaj helpo de pluraj samideanoj, ellaboris allogan 25-kvadratmetran flortapiŝon kun esperanto-teksto, okaze de la Di-festo (Corpus), vide al vide de la socia ejo, strato San Agustín, proksime al la Episkopa Palaco.

20—

* KEA celebris sian Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon la 20an de junio.

* En junio la asocio ekskursis dufoje (la 14an kaj 28an), al “Las Tuerces” en Palencia, kaj al monto Buciero en Santoña.

* Preskaŭ duonpaĝa artikolo “Lenguas internacionales especiales” (Specialaj internaciaj lingvoj) aperis en la

HEF-Bulteno n-ro 362

ĵurnalo El diario montañés, kun pluraj mencioj pri E-o.

Kastilio kaj Leono


* La 2an de ĉi julio, en la rubriko “El Callejero” (La Strata Angulo) de la loka ĵurnalo El Norte de Castilla (La Nordo de Kastilio) aperis raporteton pri la strato Esperanto, kun mencio pri la kulturaj kaj instruaj servoj tie ekzistantaj, kun mencio pri la lingvo kaj ĝia iniciatinto.

* Informoj pri la Esperanto-Grupo Fido kaj Espero de Valadolido atingeblas en la reto per “www.valadolido.eejo.com” klikante unue www.esperantoland-org/grupoj. La ttt-paĝo estas kreita de Rodrigo Portela, juna kaj entuziasma membro de la grupo.

L. Hernández

Katalunio

* Plian jaron KAE zorgos pri E-Kurso en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono (Bellaterra), en oktobro. Tamen, ĉi-jare la kondiĉoj ĝenerale iom ŝanĝiĝis, tiel ke oni ricevos nur du kreditojn pro 30 horoj ĉe ajna temaro proponita de la Universitato. La kurso, kiu okazos marde kaj ĵaŭde, komenciĝos la 18an de HEF-Bulteno n-ro 362



Jose F. Martín en “La Quinta Esfera”

oktobro kaj finiĝos la 2an de decembro, gvidata de s-ano Martí Guerrero i Cots.

* Alia kursoj komenciĝos en oktobro en Sabadell, Hospitalet de Llobregat kaj Terrasa. Kaj, cetere, KAE daŭre proponas siajn perkorespondajn kursojn katalun- kaj kastili-lingve.

José M^a Galofré

* La revuo “Kataluna Esperantisto” estas elŝutebla laŭ pdf-formato en la ret-paĝo “www.esperanto-ct.org”. Same ankaŭ 162-paĝa vortaro esperanta—kataluna, aŭtorita de Hèctor Alòs kaj Jordi Carbonell.

* La 11a Internacia E-Semajno okazos en oktobro, de la 4a ĝis la 11a en Santa Susanna (vidu Bolĉin 360, 12a p.).

Tutlande

* S-ano Jose F. Martín del Pozo partoprenis en la programo “La Quinta Esfera” (La Kvina Sfero) de Tele-5, la 3an de

septembro. Gratulon al li pro lia kuraĝo kaj... la gajnita mono!

* En la programo “No es un día cualquiera” de RNE-1, dediĉita al la temo: “¿Es importante aprender idiomas?”, retroŝte partoprenis per du legitajn mesaĝojn, unu pri esperanto, legita de la gvidantino de la programo, Pepa Fernández, kiel fermo de la debato!

* La kataluna popolmuzika E-ensemblo “Kaj Tiel Plu” turneis en Brazilo dum julio. Ĝia kompakta disko “Sojle de la klara vent’”, aĉetebblas ĉe la eldonejo Vinilkosmo.

MZD

* La 7an de aŭgusto aperis, en la ĵurnalo El País, la artikolo “Español para extranjeros - Pablito clavó un clavito”, de Sergi Pèrnies. Fine de la artikolo aperas langotorda frazo en E-o.

Dario Rodríguez

* La hispana asocio Maldekstro kaj Esperanto (SAT en Hispanio) partoprenis la feston de la Hispana Komunista Partio, starigante budon, kun lernolibroj, vortaroj kaj libroj pri la laborista E-movado. Cetere, la asocio havas propran retpaĝaron, ĉe: “<http://satenhispanio.cresmas.com>”

SATeH

* En la fako “Propagando” de ekspozicio okazinta en la madrida “Círculo de Bellas Artes” pri la Internaciaj Brigadoj, kiuj partoprenis la hispanan civilan militon, troviĝas granda afiŝo eldonita de la Kataluna Registaro en Esperanto. En ĝi aperas jenaj frazoj: “Kion vi faras por

eviti tion?” (meze de eŭropa mapo kun ponardoj, kiuj el Germanio kaj Italio minacas Hispanion), kaj “Geesperantistoj el la tuta mondo agu energie kontraŭ la internacia faŝismo”.

* Solotronik sukcese turneis junie en Nederlando kaj koncertis en la SAT-kongreso en Svislando.

* En la julia-aŭgusta numero de El Ciervo aperas lictero de Oriol Ávila, el Barcelono, al la direktoro, responde al debato pri la lingvoj en la Europa Unio en kiu oni ne menciis Esperanton.

Antonio del Barrio

La pedalaŭto

En Boletín 361, sur paĝo 24a, la aŭtoroj de la raporto pri la filmo “La pedalaŭto” menciis, ke la diversajn taskojn faris teamo de volontuloj. En aliasociaj rete publikigitaj resumitaj versioj de tiu raporto, la frazo pri la teamo estis forigita, kio miskredigas, ke la du aŭtoroj de la raporto estas la nuraj kunlaborintoj. Male, pluraj homoj el Kordovo, Madrido, Murcio, Valadolido, Valencio k.a. proponis sian helpon.

Ni volas aparte menciigi inter ilin samideanon Jesuo de las Heras, kiu tuj proponis sin kaj pretigis la bazan tradukon de la filma teksto.

Marcos Cruz
kaj Augusto Casquero

Agadplano

okaze de la centjara datreveno de la E-movado en Hispanio

La jaron 1903 fondiĝas Hispana Societo por Propagando de Esperanto (HSpPE), la unua tuthispania asocio kies celo estas la disvastigo kaj propagando de la internacia lingvo. Ni do festas dum tiu ĉi jaro 2003 la centjaran datrevenon de la organizita Esperanto-movado en Hispanio.

Tiu ĉi datreveno fariĝas okazo por agado de HEF kaj aliaj esperantistaj asocioj en Hispanio, kun la celo diskonigi la movadon en eksteraj medioj, ĉefe ĵurnalistaj kaj historiaj.

La Ĝenerala Asembleo de HEF aprobis agadplanon por kunmemori tiun ĉi okazon dum la periodo julio 2003-junio 2004. En tiu ĉi teksto ni prezentas al vi resumon de tiu agadplano.

La kunmemoro estos gvidata de HEF, sed gravas la partopreno de aliaj partoj de la movado, kiel la lokaj kaj regionaj grupoj aŭ la Fondaĵo Esperanto. Ĉar la agado baziĝas sur la helpo de volontulaj movadanoj, oni nun formas skipon, kiu zorgos pri la praktikaj aspektoj; ĉiuj interesatoj estas alvokataj sin anonci al la estraro de HEF, aŭ al mi mem, kiu kunordigos la unuajn aktivaĵojn.

En la agadoj ni ankaŭ konsideras la feliĉan cirkonstancon ke jam publikiĝis la Granda Vortaro Hispana-Esperanto, HEF-Bulteno n-ro 362

kio multe povas helpi en publikaj prezentadoj kaj ekstera informado ĝenerale. Ĝi povas taŭgi kiel alvokilo por ekstera informado, kaj, inverse, la agadoj pri la centariĝo servu kiel reklamilo por la Vortaro.

Pri la ekstera informado, oni devas substreki la vivantecon de la movado por la internacia lingvo. La diskonigo de tiu historio devas eviti gravan riskon: ke oni eltiru la konkludon (bedaŭrinde tro komunan en la ekstera vidpunkto) ke la E-movado posedis historian gravecon sed jam formortis aŭ vegetas. Tute male, oni devas emfazi la historian kontinuecon, kaj ligi la pasintajn agadojn al la nunaj celoj.

Proponitaj kaj jam faritaj agadoj

En la sekvaj punktoj oni resumas la agadojn jam proponitajn okaze de la datreveno. Parton oni jam faris ĝis la momento kiam vi legos tiujn ĉi liniojn. Kaj, kompreneble, novaj agadoj povas esti aldonitaj laŭ la marŝo de la projekto.

A. Informado interne de la movado

La unuaj agadoj celas la movadon mem, per la diskonigo de la centjariĝo kaj la movada historio al la hispanaj kaj alilandaj esperantistoj. La agado jam komencis dum la nacia kongreso, kaj la organizita skipo inkludis la mencion al la

datreveno ne nur de la hispana movado, sed ankaŭ de la valencia, kiu ankaŭ festas sian centjariĝon. Sed aliaj kunmemoroj estus tre oportunaj, ĉar ili permesos plifortigi ĉe la nunaj esperantistoj la konscion pri la graveco de nia movado en la historio de la hispana socio, kaj la fieron ke tiom da pioniroj oferis sian penon al la ideo de la internacia lingvo. Tiu kunmemoro povas do esti la komencpunkto de pli ambicia projekto por reaktiri la historian memoron de la esperantismo, kiu estas patrimonio kiun la nuna movado ne rajtas perdi. Tial ni proponas la entreprenon de agadoj kiaj ekzemple: la verko de artikoloj en internaj revuoj (Boletín kaj lokaj revuoj), organizado de serio de prelegoj pri movadhistoriaj temoj en internaj renkontiĝoj, ktp.

B. Amaskomunika informado

La centjara datreveno povas esti okazo por informado pri Esperanto al la ĝeneralaj amaskomunikiloj. Ja rutina agado tre malofte altiras la atenton de la ĵurnalaro, kiu tial uzas datrevenojn por pritrakti movadojn kiuj aliel ne donas "freŝajn" novaĵojn. La unua jam farita agado estis la sendo de komuniko specife informanta pri la okazaĵo de la datreveno al sufiĉe granda nombro da ĵurnaloj, gazetoj, radioj kaj televido, ne nur el nacia sed ankaŭ el loka kaj regiona sfero. Sekve de tio, okazis du radiaj intervjuoj dum la monato aŭgusto, en la naciaj radioĉeĉoj COPE kaj Onda Cero.

Estas planite ĝin renovigi je la fino de la jaro, naciskalc. Kaj krome, ĉiuj ekste-

raj agadoj, kiujn oni poste pritraktos, devas nepre esti akompanataj de adekvata informada politiko. Tial ni rekomendas la lokajn kaj regionajn grupojn entrepreni proprajn preskampanjojn kadre de tiu ĉi kunmemoro.

Alia celaĵo de informado estas la medioj interesitaj pri historiaj aferoj. Dum tiuj ĉi kvaronjaro estas planite kontakti specialigitajn mediojn por informi pri tiu ĉi afero. Inter ili ni sendos komunikaĵon al historiaj revuoj, al medioj kun rilato al lingvoj, kaj al aliaj sociaj komunikiloj, kiuj povas esti interesataj.

C. Asocioj kaj fondaĵoj

La kunmemoro estos okazo rilati kun eksteraj movadoj, kun kiuj oni povas reprene aŭ komenci kunlaboron cele al komunaj interesoj. Ekzemploj estas historiaj fakoj, departamentoj kaj fondaĵoj. Ni kontaktos fondaĵojn, asociojn aŭ grupojn kiuj povas esti interesitaj en sociaj aŭ historiaj aferoj, ĉefe tiujn kun komunaj interesoj, aŭ kiuj havas ian rilaton al la movado aŭ al unuopaj esperantistoj.

D. Publika administrado

La ŝtato kaj la publika Administrado havas ian specialan ejon al la datrevenoj. Tiu ĉi povas do esti la okazo rerilati kun publikaj administradoj (centra ŝtato, regionaj administradoj, municipoj kaj aliaj similaj organizaĵoj), por la organizado de agadoj.

Grava celo koncerne la publikan administradon estas ankaŭ la peto de subvencioj, kiuj kovru parton de la buĝeto de la celebrado, kaj eĉ parton de pli ĝene-

ralaj informaj agadoj. Ni prenu en konsideron ke la subvencioj estas pli facile pe-teblaj kiam ili estas direktitaj al konkre-taj agadoj, ol kiam temas pri “normalaj” tuttagaj disvolvoj de la asocioj.

E. Publikaj prezentadoj

Tiu ĉi devas esti la agado kiun oni pli zorge planu kaj kiu ricevu pli da atento, ĝuste pro la alprenita kriterio, ke la datre-veno taŭgu ĉefe por ekstera informado.


Oni programos prelegojn direktitajn al la ekstera publiko, en kiuj oni pritrak-tos tiujn ĉi historiajn informojn, kaj oni ankaŭ montros la nunan staton kaj la ce-lojn de la movado. La prelegoj okazu en ĉiuj urboj kun grupoj, precipe en kulturaj centroj kaj similaj ejoj.

En tiu ĉi kunteksto estas aparte men-ciinda la okazo oferita pro la eldonado de la Granda Vortaro. Oni povos organizi prezentadojn de tiu ĉi, kaj depende de la okazo oni pli fokusigos la agadon sur la libron aŭ sur la centjariĝon.

Ni povas ankaŭ profiti la okazon por proponi la aprobon de stratnomoj, tabu-loj aŭ aliaj objektoj (la tiel nomataj ZEOj), por kiuj historiaj datrevenoj estas ĝenerale pli oportunaj.

Oni ankaŭ proponis la starigon de ekspozicioj, sed tiu ĉi propono estas an-koraŭ studinda, ĉar ĝia plenumo estas multe pli komplika.

La historia kunmemoro estu aparte reliefigita okaze de aliaj “rutinaj” agadoj de la movado, kie oni informos pri tiu okazaĵo. Ekzemploj estas Expolingua aŭ HEF-Bulteno n-ro 362



Antonio del Barrio, ĵus elektita direktoro de Fundación Esperanto.

similaj aktivaĵoj, dum kiuj la historio es-tos traktata kiel “tema” apartaĵo.

F. Publikigoj

La kunmemoro estos bona okazo por pligrandigi la materialon por informado. Interalie, oni malfermis apartaĵon en la retpaĝaro de HEF, en kiu ni inkludis re-sumon de la historio de nia movado kaj artikolojn pritraktantajn specifajn as-pektojn de tiu historio.

Ni ankaŭ laboras super la ellaboro de mallonga flugfolio, kun resumo de la historia de la E-movado. Aliaj publiki-gaĵoj estas studindaj.

G. Kolektado de materialo kaj esplo-rado

La festado de la datreveno estos bona okazo por antaŭenigi la reakiron de la historia memoro de la movado. Dum la kunmemoro oni lanĉos kampanjon por reakiri historian materialon, kiu kelkfoje perdiĝas post la forpaso aŭ forlaso de historiaj esperantistoj kaj por krei speci-fan arĥivon de la esperanta historio.

Oni ankaŭ prenos mezurojn por reakti la kontakton kun samideanoj kiuj iam forlasis aŭ malpliigis sian aktivadon en la movado, kaj kies kunlaboro en la agadoj de la kunmemoro povas servi por repreni la iamajn ligojn. Oni invitu eksajn esperantistojn al la publikaj agadoj, eĉ kiel ĉefroluloj kaj ekzemplo de la graveco de la movado. Similan kontakton oni serĉu rilate la familianoj kaj posteuloj de forpasintaj samideanoj, kiuj nepre estu invitataj kiam oni dediĉos agadojn al ilia antaŭulo.

Tiu ĉi estas adekvata momento por antaŭenigo de esploroj rilataj al la movado. La datreveno povas esti ŝlosilo por la aliro al la dokumentoj kiuj nun restas forgesitaj.

Aliaj agadoj: ĉiuj ideoj pri agadoj en tiu jubilea jaro estas bonvenaj. Se vi deziras partopreni la skipon, kaj kunlabori en la plenumiĝo, anoncu vin al la estraro de HEF aŭ al mi mem. Ni plu informos la tutan anaron pri la entreprenitaj agadoj.

Antonio del Barrio



Ĉirkaŭ



la mondo

* Laŭ la julia statistiko de la specialaj datenbankoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kaj sensacio! Unuafoje TROVANTO estas en la unua loko! Jen la vizitoj:

TROVANTO:	1078
NAK:	965
Tabulae:	679
Ariadne:	676

Per la konsultado de la esperantistoj, la datenbanko de la Internacia Esperanto-Muzeo, IEM, havas la eblon akiri la unuan lokon en la statistiko de la jaro 2003.

Hejmpagho: “www.onb.ac.at/samm-lungen/plansprachen/index.htm”

Helga Farukuoye

* La tt-ejo Originala Literaturo Esperanta transiris de sia antaŭa adreso al: “www.geocities.com/origlit/”

Sten Johansson

* Anglalingva favora artikolo de la prestiĝa revuo Newsweek (11a de aŭgusto) aperis esperante ĉe “Gxangalo”: “www.gxangalo.com”.

* La Sveda Akademio, kiu decidas ĉiujare pri la Nobelpremio pri literaturo, finance apogas simpozion pri interkultura komunikado organizitan de la Akademio de Esperanto.

* Fondiĝis la asocio “Internacia Esperanto-Turismo” la 1an de aŭgusto kun la partopreno de du hispanoj.

* La Universitato Wonkwang en Koreio ĵus enkondukis Esperanton kiel oficialan lerno-objekton.

HEF - novaĵoj

* Post la Hispana Kongreso, HEF ekpaŝis en sia unu-jara kampanjo por festi la centjariĝon de la E-movado en Hispanio per inaŭguro de la prihistoria fako de nia retpaĝaro, kaj per reta mesaĝo al amaskomunikiloj, informanta pri la komenco de la kampanjo kaj la apero de Gran Diccionario.

Antonio del Barrio

* La 17an de aŭgusto reage al la kampanjo lanĉita de HEF, la radioĉeno COPE elsendis 15-minutan tre pozitivan intervjuon al la vicsekretario de HEF, Marcos Cruz.

Dario Rodríguez

* Ankaŭ Onda Cero Sevilla, por la tutlanda programo “La insula Barataria”, gvidata de Óscar Gómez kaj Inma

Pácz, telefonc intervjuis tri HEF-membrojn: Antonio del Barrio, Miguel Gutiérrez kaj Marcos Cruz, pri Gran Diccionario kaj pri Esperanto ĝenerale. Je la fino la trio interparolis en Esperanto por chies miro. La programon oni disaŭdigis la 21an de aŭgusto. Kaj ĝi estis aŭskultebla ankaŭ la sekvan tagon ĉe la retpaĝo de Onda Cero.

Marcos Cruz

* HEF ricevis memorplaton kiu taksas: “Ayuntamiento de San Javier / al / 60° Congreso de Esperanto / 24 de junio de 2001”. Transdonis ĝin nia s-ano Tomás Ortiz, organizinto de tiu kongreso, kiu bedaŭrinde malsanas dum la lastaj monatoj.

Manolo Parra

Urĝa Peto

Laŭ La Prezidanto de UEA, Renato Corsetti la helpo de individuoj kaj landaj asocioj estas esenca, por la pluvivado de la Brusela Komunikad-Centro. Tiu helpo nepras ne nur por 2004, sed ankaŭ en postaj jaroj. Oni provos gvidi la donacojn al la prioritatoj: informado kaj instruado. La Prezidanto asertis ke la ideo pri BKC estas unu el la dekjaraj, se ne miljaraj, revoj de eŭropismaj esperantis-

toj. En Gotenburgo la komitato de UEA decidis ne plu financi la komunikan centron, pro manko de mono. Nun Eŭropa Esperanto-Unio kaj UEA esperas, ke privataj donacoj pluvivigos ĝin.

La donacojn oni faru al la konto “Eŭropo” de UEA antaŭ la 2003.10.31. Legu pli pri tio en “<http://folio.xrs.net>”

* Kurioze, la novaĵojn pri Asturio, kiujn vi legas en ĉi numero de Boletín, ne sendis al la bulteno niaj asturiaj samideanoj, sed la Brusela Komunikad-Centro!

Tiel naskiĝis "LA DEKA LOGO"

Unue ekestis la ideo omaĝi lin. Jam de antaŭ pli ol du jaroj la estraro de HEF konsideris tiun projekton ĉar Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), pro sia multfaceta, sukcesa kaj ĉefe entuziasma kaj entuziasmiga agado pleje influis kaj plu influas la movadon ĉilandan. Ja ne mankas kialoj, bone konataj de ĉiuj: elstara beletristo verka kaj traduka, eldonisto, vortaristo, grafikaranĝisto, tradukinto kaj verkinto de kantoj, redaktoro de Boletín, daŭra aktivulo ekde sia frua junaĝo, verkinto de lernolibro, instruanto mem de la lingvo, estrarano, akademiano... ĉu necesas plui?

Venis poste la laboro organiza. Kompreneble la omaĝo nepre okazu kadre de HEF-kongreso, kaj ĝin partoprenu liaj plej proksimaj kunlaborantoj el liaj pluraj agadkampoj. Ni pensis tiam pri dumkongresa surprizo, io nur surloka kio permesus al ni laŭdi Migelukon en amikeca etoso. Pro diversaj kialoj, inter kiuj tempo-manko kaj malebleco de pluraj



partopreni, ni ne povis, kiel unue planite, celebri la omaĝon pasintjare en Alicante. Tiam ĉio restis ankoraŭ en vindoj kaj prefere ol fari ion nur mezbonan, ni decidis prokrasti la aferon kaj atendi ĝis cirkonstancoj ebligos munti belan

aranĝon. Tamen la unua verkero (kiam la ideo pri tiuspeca libro ne ankoraŭ venis niakapen), jam ekzistis en la somero de 2002. Temas pri "La verda Sizifo", de Jorge Camacho, kiun li verkis kun la celo legi (aŭ legigi ĝin, kaze de neebila ĉesto liaflanka) dum la tiam okazunta omaĝ-programero en Alicante.

Iom poste, Gian Carlo Figuiera sciinte pri la plano, komunikis sian pretecon ion verki por eventuala memorlibro, kaze ke ĝi eldoniĝu. Tiel li sugestis la ideon. Kaj tiel do stariĝis antaŭ ni la defio: kontakti eblajn kontribuantojn kaj verkigi ilin, proponi kaj akceptigi streĉan laborkalendaron, serĉi eldoniston... entute, krei libron en malpli ol unu jaro! Ŝajna frenezaĵo unuavide malfacile realigebla. Tamen tenta. Nu, kial ne provi?

Ĉiel ajn ni jam disponis unu verkeron kaj la promeson de alia. Kaj mi proponis min por kunordigo de la surpriza omaĝo, tiam jam duflanka: libra kaj surloka. Ne blinda kuraĝo pelis min, sed la konvinko, ke ĉar temas pri Miguel, certe ne mankos kunskipanoj.

Ŝajnis logike unue kontakti tiujn homojn, kiuj povintus verke kontribui, sed mia adreslisto tre magris ĉirilate. Tiam Jorge helpo provizis retadresojn. Kaj la unua cirkulero sendiĝis informante pri la plano kaj petante kunlaboron. Ĉiuj specaj reagoj alvenis: multaj entuziasme pretaj, iuj skeptikaj —tamen emaj; nepokaj tuj-tujaj, malmultaj nedecideme prokrastaj; kelkaj eĉ, simple misorientiĝis en la ret-labirinto kaj neniam trovis la vojon al mia komputilo.

Iom post iom kreskis la fasko de kolektitaj verkpromesoj kaj venis la tempo serĉi eldoniston. Kaj kio pli taŭga por verko omaĝa al verkisto kaj eldonisto de sciencfikcio ol elektronike futureska libro? Ju pli ni pripensis tion, des pli evidentiĝis, ke tiu omaĝlibro ne povus esti aliformata. Nu, kaj kiu ret-eldonas en Esperantujo? Jes, prave: Franko Luin! Mi do kontaktis lin kaj proponis la projekton, verdire sen granda espero de pozitiva reago: kial li jesu al labordona hastajo de nekonato? Kaj jen plej agrabla surprizo: li akceptis! Sed avertis, ke lia LKK-aneco por venonta UK en Gotenburgo povus okazigi problemojn pro kolizio de datoj. Tamen malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, li sukcesis ĉion pretigi akurate.

HEF-Bulteno n-ro 362



Ana Manero, denove montris sian talenton ĉe kunordigado de laborgrupo, ĉi-kaze internacia. Jen ŝi ĉe la prezentado de la elektronika libro "LA DEKA LOGO", meze de tre emocia etoso.

Leginte la unuajn kontribuojn mi tuj komprenis, ke tiel belaj verkaĵoj meritas la penon serĉi desegniston, kiu taŭge bildigu ilin. Tiun mi trovis en Santander. Pedro Ullate volonte akceptis la taskon kaj ĝin realigis per ĉarmaj desegnoj naiv-stilaj.

Poste interkonsente kun Franko, mi preparis laborkalendaron, sendis ĝin al la koncernatoj, kaj lasis la muzojn dorloti siajn favoratajn idojn. Tiel pasis pluraj monatoj dum kiuj mi foj-foje iom senpacienis: ja la verkeroj alvenis tre dise en la tempo. Sed ankaŭ ofte sentis min privilegia, ĉar mi la unua havis la ŝancon frandi ĉiujn ĵus bakitajn erojn, kiuj permesis poiome diveni la ĝuindan tuton atingotan. Paroli nun pri tiuj lantaj monatoj de krea fermentado igus la artikolon tro longa, sed almenaŭ mi rakontu du anekdotojn.



“LA DEKA LOGO” estas ĉefe elmonro de amikeco. Jen du el la aktivaj partoprenantoj: Jorge Camacho kaj Antonio Vaén.

Ja ne oftas, ke omaĝlibro enhavas kontribuon de la omaĝato mem. Niakaze tiel estas. Ni volis, ke en ĝi aperu ia mencio al la muzika flanko de Miguel, kiu tradukis “La Bambon” kaj verkis porinfanajn kantojn. Neniu pli taŭga por tio ol Flo Martorell, eldonanto de “Vinilkosmo”. Sed li bezonis pli da informoj ol la jam disponataj por verki kompletan artikolon. Ni do pensis mistifikon, por ke Miguel (absolute nescia pri nia reta komploto) mem liveru tiujn mankantajn informojn: Flo proponis al li demandaron por intervjuo aperonta en la revuo “Rok-gazet”. Sed —vi povas imagi— Miguel estis konstante okupata pri aliaj gravegaj projektoj, inter kiuj, la eldono de la vortarego... kaj la respondo al la demandaro ĉiam prokrastiĝis! Ni eĉ timis, ke ĝi ne alvenos ĝustatempe por enmeti la intervjuon en la libron. Ĝis iam, finfine Miguel reagis... sed ne respondis la

demandaron: mem verkis artikolon pri la temo, kvazaŭ por “Rok-gazet”! Nu, kion fari? Ĉu ĉerpi el la artikolo la datumojn necesajn por ŝajnigi intervjuon? Absolute ne! Tio estintus nepardoninda kripligo de la bela teksto, kiun Miguel kredis alicela. Ni do decidis enmeti la artikolon tia, kia ĝi estis verkita, kun kelkaj aldonaj komentoj de Flo. La artikolo tamen aperos siatempe ankaŭ en la gazeto.


La duan anekdoton mi rakontos, iel parenteze, ĉar ĝi havas rilaton al la surloka dunkongresa omaĝo. Tiam Marcos Cruz, maskita per falsaj lipharoj kaj peruko, sin prezentis kiel Suden Ses (avartaro de Liven Dek en la ĵus eldonita verko de Abel Montagut), kaj ludis amuzegan monologon en kiu ankaŭ grave rolis T-ĉemizo bildigita per paĝo el malnova scienficia revuo, kaj la nura surpapere printita kaj poste bindita ekzemplero de LA DEKA LOGO. Miguel ricevis ambaŭ donace. Kiel kompilanto, mi ne povis rezigni pri tiu sprita teatraĵo, tial do petis de Marcos la tekston, kaj de Franko ĝian enlibrigon por ke tiu aparte kortuŝa momento de la omaĝo neniam forvanuu. Sed ve!, vi scias: homo proponas, leĝo disponas! Temas nun pri posteldona decido, kaj ĉar la libro jam registriĝis ĉe la Sveda Nacia Biblioteko ne plu eblas enmeti ajnan aldonajon. LA DEKA LOGO restos do senmonologa, sed ni tamen publikigos la tekston de Marcos en la HEF-paĝaro kiel suplementon de la ĉefa verko. Atentu la baldaŭajn priajn novaĵojn!

En la libro vi trovos poemojn, nove-
lojn, eseojn pri Liven Dek, eseojn alite-
majn, ludan pribiografian demandaron
kaj fotoalbumon. Al ĝi kontribuis plume
Miguel Ángel Sancho, Jorge Camacho,
Sten Johansson, Miguel Fernández,
Antonio Valén, Giulio Cappa, Abel
Montagut, Gian Carlo Fighiera, Antonio
Marco Botella, Gonçalo Neves, Trevor
Steele, István Ertl (per la dua ĉapitro de
sia nova verko), Gerrit Berveling, Toño
del Barrio, Flo Martorell, Liven Dek,
Marcos Cruz (momente nur sursceneje,
sed baldaŭ ankaŭ suplemente) kaj mi
mem, kiu ion kuraĝis verki por ĉi okazo.

Kelkajn el la informoj necesaj por la
biografio havigis niaj spionoj en Santan-
der, Pedro Ullate kaj Juan Azcuénaga.
Kaj ili kulpas ankaŭ pri la provizado de
multaj el la fotoj, kiujn vi trovos en la fo-
toalbumo.

Kiam ĉio kolcktiĝis, Antonio Valén
zorge reviziis la tekstojn. Poste venis la
vico de Franko ret-komposti la verkon.
Kaj jen la rezulto: libro ne konvencia el
pluraj vidpunktoj. Ĉefe ĉar eblas legi sed
ne trafolumi aŭ manipuli ĝin. Ne forgesu,
ke temas pri virtuala libro, unu el la
unuaj en esperanto, kies unua eldono es-
tas elektrona. Cetere, ĝi akireblas sen-
page. Vizitu la paĝaron de “eLibrejo” ĉe
“esperanto.nu” kaj elŝutu ĝin. Troviĝas
ankaŭ ligiloj en la paĝaroj de HEF kaj de
“Originala Literaturo Esperanta” ĉe
www.gcocities.com/origlit/ (sub la listo
pri “novelaroj/rakontoj”).

HEF-Bulteno n-ro 362



Jen desegno farita de Pedro Ullate
por la libro, kiu tamen ne aperas en la
fina versio.

Mi ŝatus profiti ĉi artikolon por danki
ĉiujn, kiuj kontribuis per sendado de in-
teresaj verkeroj, trafaj sugestoj kaj pro-
ponoj, ĉiam bonvenaj priaj konsiloj kaj
konstanta kunlaboro. Ankaŭ la organi-
zintojn de la ĉi-jara hispana kongreso,
kiuj havigis ĉion necesan por la surloka
prezentado de la libro. Kaj ni ne forgesu
“virtuale danki Interreton”! Sen tia rime-
do neniel eblintus realigi ĉi projekton en
nur iomete pli ol naŭ monatoj. (Por ŝan-
tantaĵoj de statistikoj: entute interŝanĝiĝis
621 retmesaĝoj).

Vizitu do la “eLibrejon”, alprenu la li-
bron kaj frandu ĝin. Kaj jen lasta suges-
to: ĉar eblas ret-sendu la libron donace el
la eLibreja paĝaro, kial ne dividi lego-
ĝuojn kun viaj amikoj kaj konatoj?

Ana Manero

1) Gran Diccionario Español-Esperanto. Fernando
de Diego. mga, Santander, 2003.

2) La enigmo de l' @raneo. Abel Montagut.
IEM, Vieno, 2003.

3) La postdomo. István Ertl. Eldonejo Bero. Rot-
terdam, 2003. (Eblas legi rete ĝian unuan duonon ĉe
“<http://postdomo.nm.ru/>”.



63a Hispana Esperanto-Kongreso
 kaj 6a Eŭrop-Unia E-Kongreso

Bilbao

25a ĝis 29a de aŭgusto 2004

Facultad de Ciencias Económicas
 Avda Lehendakari Agirre

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj

Antaŭnomo:

Naskiĝdato ⁽¹⁾ HEF-numero

Adreso

..... Poŝtkodo

Urbo..... Telefono

Retadreso Faksilo

(2) Nur por statistiko

Kongreskotizoj ĝis 03-12-31 ĝis 04-04-30.. poste

Individua Kongresano (IK) 50 € 60 € 70 €

Kunulo / Junulo ⁽²⁾ 35 € 40 € 45 %

Infano (naskiĝinta post 1990/12/31) 0 € 0 € 0 €

(2) Kunulo devas loĝi kun IK, kaj Junulo estas tiu naskiĝinta post 1974-12-31.

Donaco _____

ENTUTE: _____

Kotizu pere de ŝparkaso Bilbao Bizkaia Kutxa (BBK).

konto-numero: 2095-0141-45-2218001 832 al la 63a Hispana E-Kongreso.

Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso.

Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%

LA KOTIZO ESTAS NE REPAGEBLA.


Dato kaj subskribo

Konstanta adreso: Grupo Esperantista (H K); Barrencalle Barrena, 7-1 D;
 48005 Bilbao; Tel: 944164492; 696613958; esperantobilbao@terra.com

Du verkoj eksterordinaraj

Gran Diccionario Español-Esperanto de Fernando de Diego estas, sendube, la plej atendata libroj en la lastaj jaroj, dum la "LA DEKA LOGO" estas ja la plej ne atendita libro en la historio de la hispana E-movado.

El eldona vidpunkto, 2003 estis vere magia jaro. Aĵigu al la festo!



LA DEKA LOGO akireblas "senpage" ĉe:

<http://esperanto.nu/eLibrejo>

